esperanto.es

# La Bitbulteno

**NUMERO: 36**
**2017-04-06**

**Saluton !**

**He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto.**

**Jen nova numero de la Bitbulteno de Hispana Esperanto-Federacio.**

### 100 AÑOS DE LA MUERTE DEL DR. ZAMENHOF

Dentro de unos días, el 14 de abril, se conmemora el 100 aniversario del fallecimiento del Dr. Zamenhof, el iniciador del idioma internacional esperanto.

Como ya hemos comentado en otros boletines, tanto la Federación Española de Esperanto como la comunidad esperantista en general están desarrollando una serie de actividades de conmemoración, algunas de las cuales pueden consultarse en la página http://www.gazetaro.org/eventoj/. Recordemos que la celebración ha recibido el respaldo de la UNESCO, el organismo de las Naciones Unidas por la educación, la cultura y la ciencia, a propuesta del gobierno de Polonia, su país de nacimiento.

La Asociación Universal de Esperanto ha preparado un portal http://zamenhof.life/ en una treintena de lenguas, sobre la vida y obra del Dr. Zamenhof. Mark Fettes, presidente de la UEA, subraya: "Zamenhof fue una personalidad extraordinaria. Puso en marcha un nuevo idioma sentando las bases para una comunidad lingüística global. Lo recordamos con el más profundo de los respetos". De hecho ningún otro hombre en la historia de la humanidad logró crear una lengua viva con una cultura polifacética, comparable con los idiomas étnicos o vernáculos.

Más información

### CENT JAROJ DE LA MORTO DE D-RO ZAMENHOF

Post kelkaj tagoj, la 14-an de aprilo, oni kunmemoras la 100an datrevenon de la forpaso de D-ro Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto. Kiel ni anoncis en pasintaj Bultenoj, kaj Hispana Esperanto-Federacio kaj la esperantista komunumo ĝenerale, nun disvolvas serion da aktivadoj por tiu kunmemoro, multajn el kiuj oni povas trovi en jena retejo http://www.gazetaro.org/eventoj/. Ni memorigas ke la kampanjo ricevis la apogon de UNESKO, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por la edukado, kulturo kaj scienco, post la propono fare de la registaro de Pollando.

Universala Esperanto-Asocio pretigis retejon http://zamenhof.life/ en trideko da lingvoj, pri la vivo kaj verko de D-ro Zamenhof. Mark Fettes, prezidanto de UEA, substrekas: "Zamenhof estis eksterordinara personeco. Li survojigis novan lingvon kaj tiel metis la bazon por tutmonda lingvokomunumo. Ni memoras lin kun plej granda respekto". Fakte neniu alia homo en la homa historio sukcesis krei vivantan lingvon, kiu havas multspecan kulturon kaj estas komparebla kun la etnaj kaj ŝtataj lingvoj.

Pliaj informoj

100º aniversario de la muerte de Ludwik Zamenhof
Celebrado en asociación con la UNESCO

Organización de las Naciones Unidas para la Educación, la Ciencia y la Cultura

**SEMINARIO SOBRE ESPERANTO EN SEVILLA**

El 21 de abril se va a llevar a cabo en la Universidad de Sevilla el curso "Esperanto y ciencias sociales". El seminario tendrá lugar durante todo el día en la Facultad de Ciencias de la Educación, organizado por el CIADO (Comunidad de Investigación, Acción y Desarrollo para superar la Opresión) y patrocinado por el departamento de Extensión Universitaria de la Universidad de Sevilla. Su contenido puede consultarse en http://filologia.us.es/actividades/curso-esperanto-ciencias-sociales/

Simultáneamente se ha organizado una exposición sobre el esperanto, en la Facultad de Psicología en la semana del 3 al 7 de abril, y en la Facultad de Ciencias de la Educación entre el 17 y el 21 del mismo mes.


Dirección de contacto: Esperanto en la Universidad de Sevilla: esperanto@us.es.

**SEMINARIO PRI ESPERANTO EN SEVILO**

La 21an de aprilo disvolviĝos en la Universitato de Sevilo la kurso "Esperanto kaj sociaj sciencoj". Ĝi okazos en la Fakultato pri Edukado, organizita de komunuma grupo por aktivado, kun apogo de universitataj departementoj. En la kurso prelegos interalie la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, membroj de la loka grupo kaj universitataj profesoroj; la enhavon kaj aliajn informojn eblas trovi en la adreso http://filologia.us.es/actividades/curso-esperanto-ciencias-sociales/

Samtempe, estis organizita ekspozicio pri Esperanto en la Facultato de Psikologio en la semajno de la 3a ĝis 7a de aprilo kaj en la Fakultato de Edukado inter la 17a kaj la 21a.

Kontaktadreso por Esperanto en la Universidato de Sevilo: esperanto@us.es.




**ESPERANTO EN LA PRENSA**

Un interesante reportaje en la prensa sobre el nuevo auge del esperanto ha aparecido en la revista "La Marea".

También el portal en catalán "La Directa" ha publicado recientemente un artículo con el título "Esperanto, la llengua sense nació", incluso con una

**ESPERANTO EN GAZETARO**

La plej lasta numero de la alternativa hispana gazeto "La Marea" entenas artikolon pri la nova prospero de Esperanto.

Ankaŭ la katalunlingva retejo "La Directa" publikigis artikolon pri Esperanto "Esperanto, la llengua

versión en esperanto.

La Federación ha recibido otras solicitudes de información recientemente con ocasión del centenario de Zamenhof. Sugerimos estar atentos a las noticias, y también recomendamos a los grupos locales y a otros activistas que contacten con los medios de su ciudad, para dar a conocer el centenario y, en general, aprovechar la ocasión para informar sobre la figura del Dr. Zamenhof y sobre el esperanto.

sense nació", kun versio eĉ en Esperanto mem!

La Federacio ricevis lastatempe aliajn petojn pri informado, okaze de la datreveno de la forpaso de Dro. Zamenhof. Ni sugestas atenti la gazetaron dum venontaj tagoj, kaj ni ankaŭ rekomendas al la lokaj grupoj kaj aktivuloj kontakti siaurbajn komunikilojn por konigi la datrevenon kaj, ĝenerale, profiti la okazon por informi pri la figuro de Dro. Zamenhof kaj pri Esperanto.




**MÁS SOBRE EL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO**

Recordamos que a finales de este mes de abril finaliza el segundo periodo de adhesión al Congreso Español de Esperanto. Más de 80 personas de tres continentes y una docena de países se han apuntado ya a este encuentro, que tendrá lugar a finales de junio en Teruel.

Un artículo sobre el congreso y sobre el motivo turístico principal (el 800 aniversario de la leyenda de los Amantes de Teruel) ha aparecido en la revista "La Ondo de Esperanto", publicada en la ciudad rusa de Kaliningrado (Hispanoj kongresos ĉe geamantoj)

El programa provisional puede consultarse en la página web del congreso, donde también aparece información sobre las actividades pre- y post-congresuales.

Recordamos también que durante el congreso se podrá realizar la prueba oral de los exámenes oficiales de esperanto, cuya parte escrita tendrá lugar el día 10 de junio en Zaragoza y en muchas otras ciudades del mundo. Para más información: http://edukado.net/ekzamenoj/ker y para inscribirse: kurso@esperanto.es

Más información sobre el congreso http://www.esperanto.es/congreso. Para inscribirse: http://www.esperanto.es/kongresaligo.

**PLIE PRI LA HISPANA KONGRESO EN TERUEL**

Ni memorigas ke fine de tiu ĉi monato aprilo finiĝas la dua favora aliĝperiodo por enskribiĝi en la Hispana Kongreso de Esperanto. Jam pli ol 80 homoj el 3 kontinentoj kaj dekduo da landoj jam aliĝis al tiu ĉi renkonto, okazonta fine de junio en aragona urbo Teruelo.

Artikolo pri la kongreso, la loko, kaj la turisma ĉefmotivo (la 800a datreveno de la legendo de la Geamantoj de Teruelo) ĵus aperis en la revuo "La Ondo de Esperanto", eldonita en la rusia urbo Kaliningrado (Hispanoj kongresos ĉe geamantoj)

La detalan provizoran programon eblas legi en la retejo de la kongreso, kie ankaŭ aperas la antaŭ- kaj post-kongresaj planoj.

Ni memorigas ankaŭ ke dum la kongreso eblos ekzameniĝi oficiale pri Esperanto. Temas pri la parola parto de la tutmonda ekzameno, kies skriba parto disvolviĝos la 10an de junio en Zaragozo kaj multaj aliaj urboj de la mondo. Pliaj informoj kaj enskribiĝo: http://edukado.net/ekzamenoj/ker kaj kurso@esperanto.es

Pliaj informoj pri la Kongreso: http://www.esperanto.es/kongreso. Kaj por aliĝi: http://www.esperanto.es/kongresaligo.



## SEMANA INTERNACIONAL DE LA CULTURA Y EL TURISMO

Se van conociendo más detalles de la Semana Internacional Esperantista de la Cultura y el Turismo, que este año celebra su 25 edición entre el 30 de septiembre y el 7 de octubre en Tossa de Mar, en la ‘Costa Brava’ (provincia de Gerona)

Entre los conferenciantes se contará con la presencia de Giancarlo Fighiera, Thierry Saladin, Ana Manero, Luz Vázquez o Toño del Barrio. El Premio Ada Sikorska-Fighiera será entregado este año a Ana Manero.

El programa turístico incluirá la misma Tossa de Mar, además de Besalú y Blanes, dos bellas ciudades de los alrededores. Además, el programa conservará elementos tradicionales de la Semana, como la degustación de “rom cremat” o un espectáculo de danzas catalanas, entre otros.

Este año está previsto orgaizar un homenaje especial al organizador de la semana durante muchos años, Luis Serrano.

Para conocer la forma de apuntarse y otros detalles, puede consultarse la web : https://kulturacentro.blogspot.com.es/

## INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO

Iom post iom aperas novaj informoj pri la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, kiu ĉijare celebros sian 25an eldonon, de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro en la urbo Tossa de Mar, en la t.n. ‘Costa Brava’ (Brava Marbordo).

Inter la prelegantoj troviĝos Giancarlo Fighiera, Thierry Saladin, Ana Manero, Luz Vázquez aŭ Toño del Barrio. Oni aljuĝos denove la premion Ada Sikorska-Fighiera, ĉijare al Ana Manero.

La turisma programo direktiĝos al Tossa de Mar mem, al Besalú kaj al la Botanika Ĝardeno en Blanes, ĉiuj belaj urboj de la regiono. Krome, oni konservos la tradiciajn programerojn pri gustumo de bruligita rumo, katalunaj dancoj, ktp.

Dum la programo oni faros omaĝon al la dum longa tempo prizorganto de la Semajno, Luis Serrano.

Pliajn detalojn kaj aliĝilon oni povas trovi ĉe: https://kulturacentro.blogspot.com.es/




## ESPERANTO COMO LENGUA SECRETA

El día 6 de abril a las 7 de la tarde se presenta en la librería Katakrak de Pamplona el libro de Fermin Ezkieta

## ESPERANTO KIEL SEKRETA LINGVO

La 6an de aprilo je la 7a vespere oni prezentos en la librejo Katakrak de Pamplono (Navaro) la libron de

«Los fugados del Fuerte de Ezkaba».


Se trata de una segunda edición ampliada del libro que describe una de las más importantes fugas producidas de un campo de prisioneros de guerra, la del fuerte de San Cristóbal o de Ezkaba, en Pamplona, en la que, curiosamente, el esperanto tuvo un papel como lengua secreta de los organizadores. Sobre este episodio puede leerse en la web (en castellano y esperanto)

Un acto previo de presentación tuvo lugar el pasado día 30 de marzo en Sestao, en la llamada Margen Izquierda del Nervión, de donde procedían algunos de los protagonistas del (a la postre trágico) acontecimiento. Varios compañeros esperantistas estuvieron presentes y tuvieron ocasión de intercambiar unas palabras con el autor del libro.

Fermin Ezkieta «Los fugados del Fuerte de Ezkaba».

Ĝi priskribas ege interesan (kaj tragikan) okazaĵon dum la hispana interna milito: la fuĝo de centoj da respublikanaj prizonuloj el fortreso en tiu urbo Pamplono, el kiuj nur tri sukcesis forfuĝi en la fino. Speciale frapa estas la utiligo de Esperanto dum la pretigo de la eskapo, por konservi la sekreton, pri kiu vi povas legi en tiu ĉi artikolo, kaj pri kiu la nova eldono malkovras pliajn detalojn.

Antaŭprezento okazis la pasintan 30-an de marto en Sestao, apud Bilbao, el kie devenis parto de la ĉeforganizantoj de la fuĝo. Kelkaj esperantistoj ĉeestis la prezenton kaj havis la okazon interparoli kun la aŭtoro de la libro.




**NUEVO FORMATO EN RED DEL BOLETÍN DE HEF**

La Federación Española de Esperanto ha publicado el último número (enero-marzo 2017) de su "Boletín" en un nuevo formato, como revista en red.

No se trata de la publicación en versión pdf, que ya existía desde hace tiempo, y cuyos números más recientes pueden ser consultados por los miembros de la asociación en el espacio interno de la web (y el resto por todos los interesados de forma abierta) .

Se trata en esta ocasión de un formato muy atractivo, adaptado a todos los dispositivos lectores. Se puede acceder en la dirección: http://esperanto.es/boletin/.

En esa dirección se pueden ver de forma directa el editorial y el

**NOVA RETA FORMATO DE BOLETÍN**

Hispana Esperanto-Federacio publikigis la plej lastan numeron (januaro-marto 2017) de sia gazeto "Boletín" en nova formato, kiel revuo en la reto. Ne temas nur pri la pdf versio, kiu ankaŭ estas facile atingebla de la membroj de la asocio en la interna spaco de la retejo, sed pri bela formato, adaptita al la legado en la reto per ĉiuj legiloj. Vi povas ĝin aliri en la adreso: http://esperanto.es/boletin/

Tie vi trovos rekte la ĉefpaĝon kaj ĉefartikolon, kaj la resumon de la artikoloj. Por membroj de HEF, eblos aliri la tutan Boletín, enirante en la paĝo pere de via uzulnomo kaj pasvorto (se vi ne havas ĝin, bv. peti al la retejestro esperanto@esperanto.es)

contenido. Entrando en la web con el correspondiente nombre de usuario se puede acceder a todos los contenidos.

Durante los próximos dos meses esta posibilidad estará además abierta a todos los interesados, aunque no sean socios de la asociación. Para ello bastará introducir la palabra “prueba” tanto en el nombre de usuario como en la contraseña. Confiamos que os guste tanto que alguno se anime a unirse a la Federación ;-)

Sed dum la venontaj du monatoj, escepte kaj kiel provo, la paĝo estos alirebla por ĉiuj interesitoj. Por tio, utiligu la uzulnomon kaj la pasvorton "prueba", ĉar ni deziras ke dumtempe ankaŭ aliaj esperantistoj, ne membroj de HEF, povu ĝui la revuon -- kaj eble vi tiom ŝatos ke ni konvinkos vin fariĝi HEF-ano ;-)

Nun troviĝas tie la numero 417 kaj ankaŭ la 416 (en indekso "aliaj numeroj"). Temas pri la du unuaj provaj numeroj, kaj do komentoj kaj korektoj bonvenas.



